



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 6-a de Aprilo 2021

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

a) **Jehoŝua:** pro la neklara sanstato de Jinon, ni estu pretaj ricevi telefonvokon de lia frato pri la evakuo de niaj libroj el lia loĝejo. Tial ni devas havi magazeno baldaŭ preta.

2. Financoj (Ŝlomo)

La prezoj de la kontisto iom altiĝis, sen antaŭa averto. Ĉu ni daŭrigu kun li?

Voĉdono: unuanime jes.

3. Dratverejo

a) **Jehoŝua:** la luantoj ne pagas eĉ la domkotizon, 70 siklojn monate laŭ Avraham, la domkomitatano. Ludmila (la patrino) asertas, ke ŝi lupagos, sed atendas la subvencion de la Nacia Asekur-Institucio.

b) **Jehoŝua:** Ŝlomo telefonu al la asekurkompanio – ili ŝuldas al ni ankoraŭ remeton de la lavabo en la banĉambro kaj riparon de la ekstera damaĝo en la konstruaĵo.

c) **Amri** proponas renovigi la evikcion. **Ŝlomo:** kostos ĉ. 6,000 NIS por reaktivigi la evikian proceson kaj repostuli la ŝuldon (pro ĉekoj). La seruron ni povos ŝanĝi nur poste. **Decido:** Ŝlomo renovigu tuj! – **unuanime akceptita!**

4. Kunvenoj / kunsidoj

a) **Jehoŝua:** ni devas renovigi la fizikajn kunvenojn. Antaŭ ol elekti inter la lokaloj, ni provu unue en *Bejt-Oazis*, kaj baldaŭ.

b) **Amri, Gabi:** Ni devus miksi la zomajn kaj la fizikajn kunvenojn, alterne.

c) **Jehoŝua:** Estas bezonata opini-sondo ĉe la membroj pri ties preferoj (ĉu zoman ĉu fizikan, kaj en kiu lokalo) kaj jam dum la sondado demandi pri la miksitaj ebleco. Tuja provo inter la estraranoj montras, ke la plimulto preferas zom-kunsidojn!

d) **Amri** tuj kontaktas la repondeculon en *Bejt-Oazis* pri **mardo, la 20 de Aprilo**. Temas pri kunveno dum 1½ da horoj kun regalo (kafo/teo, kuketoj), kontraŭ 158 NIS (ĉ. 650 NIS por 4 fojoj monate). Por kompari: en *Bejt-WIZO* ni pagas 1,120 NIS por la sama daŭro, tamen sen aldono pro kunsidoj. **Decido:** okazu provkunveno (sen devontiĝo) en *Bejt-Oazis* laŭ la supraj kondiĉoj – **unuanime akceptita.**

5. Oficejo (Amri)

a) Ĉu proponi 180 mil siklojn por la oficejo, pri kiu ni parolis lastfoje?

2/...



- b) Ne ekzistas ankoraŭ parceligo (טאבר) por tiaj novaj konstruaĵoj. Ni devas peti dokumentojn, ke la vendisto leĝe rajtas vendi la oficejon. La advokatoj revizios la dokumentojn (nia advokato estas d-ro Ram Modan).
- c) Kiu konstruos la vandon (dividan muron) inter la nunaj duonoj de la oficejo?

6. Israela Kongreso – 2021 (Amri)

- a) Nia supozo praviĝis: ne indas aranĝi la kongreson en aprilo, ĉar ne povos veni eksterlandaj gastoj. La trajna trafiko revenis parte – sed la trajnoj daŭre ne haltas ĉe la flughaveno. Ni provu fari la IK-on en Oktobro! Sufiĉas unu monato antaŭ la evento por ĝin organizi. En 2022 ni revenos al Aprilo.
- b) Amri sciigis ĉiujn eksterlandanojn pri ebleco de repago – kelkaj pagis parton aŭ tuton por nia nuligita jara semajnfina kongreso: ili povos rricevi la pagojn (minus 15 eŭroj pro administraj elspezoj) – aŭ ŝpari ĝin por nia venonta kongreso. Estas ĉ. 25 homoj. 4 brazilanoj jam sciigis, ke ili devas rezigni, kaj petis rricevi la pagitan sumon. (ĉ. 1,000 eŭroj minus 15 eŭroj/persono). Amri jam petis la CO-n repagi al ili el la konto de ELI.
- c) Konsiderante, ke tiam jam povos veni eksterlandanoj, la eblaj datoj por la ĉi-jara IK estas: 30 de Septembro-2 de Oktobro, 7-9 de Oktobro, 14-16 de Oktobro (en la sama gastejo **Bnej-Dan** en Tel-Aviv). Ni devos pristudi kaj esplori la eblecojn.

La venonta kunsido: la 4-an de Majo 2021, je la horo 20h00 (*zom-kunveno?*)

Protokolis: Gabi Zeevi